# EKO 2021
## Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok jaroj, depost 2013

2020: rekorda jaro: kun 60 komunikoj

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

EKO 2021-27 sendita el Budapeŝto la 19an de julio

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# Studebloj tuj je via servo

**Kaptu la okazon kaj aliĝu al la sekva interlingvistika grupo aŭ informu viajn konatulojn pri la universitataj studoj! Ili okazos plejparte rete.** Jam estas aliĝintoj el Ĉinio, Koreio, Brazilo, Francio, Norvegio, Slovakio….

Ĵus aperis varbfilmeto por la nova interlingvistika grupo:

https://www.youtube.com/watch?v=-cvm2ybeKcs

Vi povas trovi informojn en: https://edukado.net/novajhoj?id=849 kun aliaj filmetoj kaj en la retejo de la studoj: http://interl.amu.edu.pl

Intervjuo kun la gvidanto de la Studoj en:

http://pola-retradio.org/2021/04/e_elsendo-el-la-07-04-2021/

Prezento de la Interlingvistikaj studoj fone de universitata instruado: https://esfconnected.org/2021/07/09/interlingvistikaj-studoj-uam-poznano-pl/

Se vi bezonas pluajn informojn au volas aliĝi, skribu al: interlin@amu.edu.pl

# Tra la mondo iras forta VoKo.

Aperis programo de la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto kaj la Virtuala Movada Foiro:

https://revuoesperanto.org/programo_vk_2021

Tion anoncas la sesa Kolombo (tipe 4-paĝa ilustrita informilo), kiu estas libere elŝutebla:

https://revuoesperanto.org/kolombo_6

La kolomboj flugas preskaŭ ĉiutage! Jam aperis intertempe numeroj 7 kaj 8. Trovu ilin samloke. Jen nekredeble valora projekto de UEA, kiu egale servas la nunajn membrojn kiel la potencialajn. La kvina kolombo alportis kaj deponis al via apudeco informojn por AMO 74 okazonta en VK 2.

# AMO 74 – malferma al viaj ideoj!

Tio okazos tra tri horoj ekde 12.00h UTC en ĵaŭdo la 22a de julio. La temo estos: 'Kiel altiri pli da junaj membroj tra Eŭropo". La ĉefa prezentaĵo estos farita de la prezidanto de UEA, Duncan Charters, kiu delonge okupiĝas pli la altiro de pli junaj homoj al niaj kolektivoj. Enkondukon jam pretigis kaj dissendis Stefan MacGill, antaŭa vic-prezidanto de UEA. Sed la cetera programo

konsistos el forumo, do estos egaj ebloj por unuopuloj kontribui per pensoj kaj proponoj. Tiuj formos bazon por AMO 77, okazonta en Pollando septembre, kun simila temo.

### Nur unu el pliaj ideoj por diksuto:

Ni spertis en 2020 kaj denove en 2021 la sukceson de la hispanlingva kurso, kiu portis novajn junajn parolantojn al la latinamerika komunumo kaj al la membraro de UEA. Ni demandas: ĉu io simila ne eblas por Europo?  Ja, la eŭropa popolo estas ekstreme multlingva, sed por multaj lingvoj ni havas abundon da kursoj. La Eŭropa Komisiono nun laboras sisteme arigi informojn pri ili. Nun la defio estas koherigi ilin al komuna programo, kiu, simile al la latinamerika kurso, efikos sur la membraro de UEA/TEJO en la kontinento por mallevi la averaĝan aĝon de pli ol 60 ĝis iu cifero ie en la 50-59-jara gamo – cele al la averaĝa aĝo de la popoloj (ĉ. 40-jara).

Do, se vi havos tempon kaj emon ĵaŭde, aliĝu al la programero kaj kontribuu per viaj ideoj!

## AMO 75 pri kulturo

Tiu aranĝo okazos pere de la kulturcentro Greziljono kredeble en du tagoj, la mardo kaj ĵaudo. En tiu tempo ni prezentos resuman programon pri la AMO-programo de unu ĝis sepdek-kvin – odisea vojaĝo de 2014 ĝis Oceanio. Ni alkroĉas la programon pri tio, pretigita por monata kunsido en Aŭstralio, sed servanta ankaŭ por la jubilea seminario.

## Germanaj kursoj por lerni  Esperanton

La Eŭropa Komisiono de UEA lanĉis klopodon resumi la abundon de kursoj por Esperanto ekzistanaj por diversaj lingvaj grupoj. Tio okazas, prepare al propono al UEA, ke ĝi en Eŭropo starigu similan projekton al tiu, kiu ege sukcesis tra latinameriko, kaj intertempe enplektis pliajn kunlaborantojn, nelaste HEF, la Hispanan Esperanto-Federacion, kie estas la hispana landa asocio de UEA. Tiu projekto kreskigis la membraron de UEA kaj alportis multajn junulojn. Similon bezonas Eŭropo.

Pioniris projektoj kiel *Duolingo*, kiu ja havis efikon, sed UEA neniam kapablis ricevi liston de la kursfinintoj, necesis pene logi ilin al niaj invitoj (kiel ekzemple al la geonkla genepa servo de <edukado.net> 'Ekparolu'. Se ni kunigus niajn fortojn, ni mem povus ricevi la nomojn kaj retadresojn de kursfinintoj el diversaj kursoj, kaj premii ilin per unujara prova membreco en UEA (kaj de ILEI!).

### Kelkaj germanaj projektoj (iuj multlingvaj)

. Esperanto en dialogo - http://agei.esperanto-urbo.de/netzkurs/ (tre detala lernmaterialo, kun vortaro, ekzercoj, gramatikaj klarigoj, ellaborita de Dr. Rudolf Fischer)

1. Lernu.net (lecionoj, vortaro, gramatiko, forumo en multaj lingvoj)
2. Kurso de Esperanto (t.n. brazila kurso, 12 lecionoj, ekzercoj, ktp.)
3. Esperanto en 12 lecionoj (laŭ la t.n. zagreba metodo, kun ekzercoj)
4. Esperanto per rekta metodo 1 kaj 2 (de Stano Marĉek, kun ekzercoj, por Android-telefonoj, akireble en multegaj lingvoj)
5. EO Esperanto (de Goethe-Verlag in 50 lingvoj, laŭ temoj, mp3 sonmaterialo, ekzercaro. ankaŭ por Android, iPhone)
6. Lingolia (gramatiko, ekzercoj, ellaborita de Heike Pahlow, en kunlaboro kun Esperanto-Centro Herzberg)
7. Babadum (vortlernado, ekzercado)

Gazeta kursserio (lecionoj 1-15) aperinta en la regiona gazeto Harz Kurier, ellaborita

de Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy, Herzberg am Harz
Televida kursserio (lecionoj 1-5) prezentita de Thomas Bormann ĉe SWR1 Baden-Württemberg
Detaloj ĉe http://agei.esperanto-urbo.de/page.php?pid=54861342

Zsofia Korody, La Eo-urbo Herzberg am Harz




## Kampanjo al Unesko pri la Esperanto-Tago

Ĝis nun ni ricevis partoprenajn anoncojn el **30 landaj** asocioj aŭ aktivuloj. Ili estas Angolo, Aŭstralio, Benino, Brazilo, Bulgario, Burundo, Ĉinio, Danio, DR Kongo, Germanio, Hispanio, Irano, Japanio, Kroatio, Litovio, Mongolio, Nederlando, Nepalo, Pollando, Portugalio, Rusio, Senegalo, Slovakio, Sud-Afriko, Taĝikio, Tanzanio, Venezuelo, Vjetnamio, Urugvajo kaj Uzbekio.

El ili Danio, Germanio, Hispanio, Irano, Nederlando kaj Portugalio **6 landoj**, jam sendis la proponajn leterojn al siaj landaj Unesko-Komisonoj/oficejo.

Ni havos ankoraŭ du semajnojn en Julio. La Plenuma Estraro de Unesko deklaros la Tagordon en ĉirkaŭ la 10-a de septembro. Vi do devas konvinki viajn naciajn Unesko-komisionojn iniciati la proponon al Unesko **antaŭ fino de julio**, ĉar ni devas lasi al Unekso minimume unu monaton, por ke ili digestu kaj selektu la plej taŭgajn el amasoj da proponoj el Membraj Ŝtatoj. Post la selekta decido de la Plenuma Estraro Unesko bezonas tempon traduki ilin en ĉiujn UN-lingvojn kaj aperigi ilin sur sian retejon.

Ĉiuj proponaj landoj aperos sur la Unesko-dokumento. Se vere malfruos viaj proponoj, viaj landoj **riskas NE aperi sur la Unesko-deklara dokumento**, tamen **la proponoj post julio daŭre valide helpos** en la oficiala voĉdono en novembro tiam, kiam Unesko decidos voĉdonon pri Esperanto laŭ proponoj de aliaj Unesko-komisionoj/oficejoj.




Bonvolu informi al UEA ĉe <***esperanto.tago.kampanjo@co.uea.org***> , post kiam vi sendis la proponon al via landa instanco aŭ vi havas novaĵon el viaj naciaj Unesko-Komisionoj/Oficejoj. Ni liveros al vi bezonatajn dokumentojn en la angla, franca, hispana, portugala kaj Esperanto laŭ via peto. Ni raportos la novan progreson la 22-an de julio post 7 tagoj.

Huang Yinbao (Trezoro), vicprezidanto de UEA.

# Turka frandaĵo

Turka Stelo nun havas sian propran kaj simplan retejon.

https://turkastelo.wordpress.com/

Uzu la retejon por elŝuti ĉiujn malnovajn numerojn aŭ legi la lastan numeron rete.

En la retejo troviĝas ankaŭ helpoj pri kie kaj kiel legi la diversajn versiojn de la revuo, kiel aboniĝi ktp. Bonvolu disvastigi ĝin al viaj geamikoj. Restu sane!

Vasil Kadifeli

# Interlingvistoj interesiĝu

Trovu la novan numeron (3/2021) kaj pli fruajn numerojn ĉe: http://www.esperantic.org/eo/publikajoj/ipi/.

Tie vi trovos detalan enhavtabelon. Inter la eroj en la 20-paĝa bulteno:

- Retoso – nova ambicia projekto de TEJO.
- PLPLE21: Seminario pri Lingvopolitiko, Lingvoplanado kaj Taksado en Mezameriko kaj Karibo
- Seminario ĉe la Doktoriga Lernejo en la Universitato de Tours, Francio

========= vortoj: 1160 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝisla fino de majo 2021 (per EKO 2021-22). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.


**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.

**Servo subtenata de Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**

ILEI

Redaktoroj:
Stefan MacGill kaj Mirejo Grosjean



**ENHAVO**


- Poznano vokas
- VoKo vokadas
- AMO 74 tujas
- Eŭropaj lerniloj
- Esperanto-Tago
- Turka Stelo